

Pola Esperantisto

Esperantista Polski

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO KAJ EKSTERLANDE
MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE I ZAGRANICĄ.

WYDAWCY: POLA ESPERANTISTA KLUBO &
ELDONANTOJ: SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW.

REDAKTORZY PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI
REDAKTANTOJ

XXVII JARO. NR. 2

Redakcio kaj
Administracio KRAKÓW, LUBICZ 34.
Abonprezoj ktp. vidu te finu de l' tekstparto.

FEBRUARO 1933.

GRAVEGA AKIRO.

Fine krevis la glacioj de indiferenteco por Esperanto en polaj radio-sferoj! Post unuaj senfidaj decidoj, favoraj tamen al ni, konsiderataj nur kiel provoj, ni eniris jam en duan periodon, kie Esperanto en pola radio komencas akiri firman pozicion. Tre ĝojiga estas al ni la lasta decido: de marto okazados Esperanto-prelegoj dufoje en monato, kio estas jam granda paŝo antaŭen.

Tiun decidon kaŭzis tre multaj kaj tre favoraj recenzoj pri la okazintaj prelegoj. Ne unufoje montriĝis la vera sinteno de aŭtoritatoj koncerne Esperanton: oni rekonas kaj subtenas ĝin, se ĝi montras evidente sian praktikan valoron.

La nunan opinion de radiestraro pri Esp. vi jam parte konas. Ja prezentis ĝin s-o prof. Bujwid dum la Lublina kongreso. „Neniu prelego en ia ajn lingvo kaŭzas tiel fortan eĥon en ĉiuj landoj, kiel la prelegoj en Esperanto“. Atestas tion tre multaj korespondoj kaj dankoj ricevitaj amase. Nekutima okazaĵo estis iu danko ricevita eĉ el... Aŭstralio. Nekredeble?! Oni diris tion en la Krakova studio.

La februara prelego estis aŭdigata per ĉiuj stacioj polaj krom tiu en Katowice. Do post la venonta prelego, kiun okazigos s-o prof. Bujwid la 8-an de marto (merkrede) je la 22 h. 40 m. bv. konsideri kiel via sankta devo ataki al Katowice per petskriboj, ke ankaŭ tiu stacio allasu Esp-on, ĉar ĝis nun ĝi estas la plej obstina. Sed skribu ankaŭ al Warszawa. Nia plej grava akiro estas la favoro de la staciego en Warszawa, ĝi estas bone aŭdebla en la tuta Eŭropo kaj apartenas al plej fortaj en la mondo. Do la favoro de tiu stacio estas vere nia juvelo. Komencinte tiel sukcese, ni ne povas halti sur tiu vojo. Nia nuna plej proksima celo estu: kvaronhoro esperanta ĉiusemajne. Ankoraŭ ne petu, unue danku por tio, kion ni nun havas. Kaj aŭtune la kurso! Eble tiam ni povos ankaŭ paroli pri pure Esperanto-temoj. Nune ili ne dependas de ni.

La plua sukceso dependas nur de vi, karaj gesamideanoj. Speciale gravaj estas la voĉoj de eksterlandanoj. Vi, kiuj korespondas, petu ilin letere pri ilia helpo. Ni faras tion per la gazetaro.

Pri aliaj projektoj koncerne radion, ni donos informon, kiam ili jam estos realigitaj. Th.

NI KREU POLAN ESPERANTAN GAZETARAN INFORM-SERVON!

Malgranda mencio de „Heroldo“: „Sveda Esperanta Gazetara Inform-Servo povas pri decembro 1932 raporti, ke ĝi konstatis 65 artikolojn en 24 malsamaj gazetoj. 22 el la artikoloj SEGIS mem dissendis“.

La Svedoj ekkomprenis, ke la mankon de la pri — kaj por-esperantaj artikoloj kreas tre ofte ne la negativa pozicio de iu ĵurnalo koncerne al nia lingvo, sed tute simple la fakto, ke estas neniu, kiu la aferon prizorgus, kiu regule diversajn priesperantajn artikolojn al la gazetaro sendus.

Ĉe ni oni ĝis nun tion ankoraŭ ne ekkomprenis. Kaj tamen, tia Inform-Servo estas ĉe ni certe pli bezona ol en Svedujo. Trapasas tre ofte longaj monatoj, kaj niaj gazetoj nek unu vorton skribas pri Esperanto. Tiu stato devas esti nepre ŝanĝita. Kulpigi tie ni povas nur nin mem. Se ni klopodus pri tio, se ni skribus kaj sendus bonajn artikolojn pri Esperanto — ili estus certe tre volonte akceptataj.

Sed — tio devas esti farita, ne kiel ĝis nun — senorde. Tiun Inform-Servon ni devas bone organizi, kun centrejo kaj filialoj en ĉiuj grandaj urboj ktp. La laboro ne tre malfacila, kaj fruktojn ĝi povas doni eksteordinarajn.

La neceso de tiu Inform-Servo estas tute evidenta. Restas ankoraŭ nur unu demando: Kiu devas tion organizi? Ŝajnas al mi, ke P. E. D., kiel nia oficiala reprezentantaro devas sur siajn ŝultrojn preni la kreadon de tiu-ĉi Inform-Servo. — Do ni atendas!

ELI

Certe la ideo prezentita en ĉi-supra artikolo „boras“ delonge en kaĵoj de multaj polaj Esperantistoj. Informi la polan gazetaron pri Esp., ĝiaj problemoj kaj progresoj oni devegas nepre. Sed la laboro devas esti organizita kaj plane gvidata.

Jam estis siatempe farita la komenco. Ni decidis eldonadi „Pomocniczy Język Światowy“ — la revuon celantan diskonigi Esperanton inter ne-Esperantistoj. La artikoloj en ĝi estis represotaj en nacilingvan ĵurnalaron. Anstataŭ verki ian artikolon kaj enmeti ĝin nur en unu gazeton ni volis, ke la plej bonaj, trovitaj en la esp.-gazetaro, represiĝu en multaj lokaj gazetoj. Ni volis ŝpari fortojn, rikolti pli multajn fruktojn.

Sed la ideo estis kvazaŭ nekomprenata. Mankis la vigla subteno flanke de esperantistoj — kaj rezulte la gazeto ĉesis aperadi. Pri la granda defecito ni prefere ne parolu! Kaj la gazeto estis ja tre malmultekosta!

La inform-servo estas sendiskute nepra, sed kiu devas ĝin fari? Kompreneble P. E. D. Disponi tre facile, sed tiuj tri literoj nenion faros,

se mankas la homoj. Dum la kongreso en Lublin, se vi memoras, estis dirate, ke oni devas la laboron farotan de P. E. D. dividi, atribui al diversaj grupoj en Pollando kaj tiel racie la laboron ebligi.

Reprezentantoj de diversaj grupoj promesis interkompreniĝi kun ili kaj respondi al P. E. D., kiu kiun laboron elektas. Ĉu vi supozas, ke iu anoncis sin tiucele? Ho ne!

Estas ja homoj, kiuj nur scias „bonvole“ kritiki, sed ili faras nenion. Ili „ne havas tempon“. Tio ja estas kutima afero.

Nur unu valora escepto estas la samideanoj en Bydgoszcz. Tie oni laboras pace, konkorde kaj progresse. Tie oni ankaŭ forte kritikas, sed ili rajtas tion fari, ĉar ili mem laboras. Ili estu modelo por ĉiuj Esp.-istoj en Polujo.

P. E. D.

P. S. En Warszawa estas priparolata simila ideo. Detaloj sekvos.

AL LA POLA ESPERANTISTARO!

Observinte la Esp. movadon en Polujo dum kelkaj jaroj, mi konstatis, ke ĝuste ĉe ni la esperantistaro vere ne bone komprenas la valoron kaj signifon de nia ideo kaj tio kaŭzas la mankon de necesa konkordo. Trarigardu la jarkolektojn de Pola Esperantisto de la lastaj 9—10 jaroj kaj vi mem havos la plej bonan pruvon pri la Esp. movado. Antaŭ ĉio mankis unueco, kaj la direktilo de nia movado ne havis firman direktanton, ĝis fine en jaro 1926 fondiĝis la nuna Pollanda Esperanto Delegitaro (PED).

De post tiu tempo la Esp. movado multe pliboniĝis, sed malgraŭ tio la plejmulto de la esperantistaro estas indiferenta kaj ne sufiĉe subtenas P. E. D.

Karaj gesamideanoj! Nia organizo P. E. D. similas al horloĝa mekanismo konsistanta el diversaj radoj kaj radetoj, kiuj ĉiuj laboras harmonie, kaj kiam nur unu radeto malobeos, tiam la tuta mekanismo ekhaltos. Simile okazas en P. E. D., al kiu apartenas diversaj Esp. grupoj kun membroj riĉaj, malriĉaj, kleraj kaj simplaj. Do, ĉiuj antaŭe nomitaj senescepte nepre devas plenumi sian devon en konkordo, se ni deziras, ke nia P. E. D. bone funkcii. Ŝajnas al mi, ke finfine ĉiuj tion ekkomprenis kaj dum la Esp. kongreso en Lublin oni faris la unuan paŝon, kreinte unuanime la Plenan Komitatoŝon de P. E. D. Same kiel la mekanismo bezonas bonan prizorgadon, streĉon de la risorto, ŝmiradon k. t. p., P. E. D. ankaŭ devas esti prizorgata kaj subtenata de la tuta esperantistaro. Por ke ĉiuj geesperantistoj sciu, kion ili devas fari kaj havu plenan superrigardon pri la Esp. movado en Polujo, P. E. D. eldonas sian oficialan organon, la Polan Esperantiston, monatan gazeton.

Kaj ĝuste tie ĉi estas la plej grava punkto, pri kiu nur malgranda parto de nia esperantistaro interesiĝas. Ekzistas eĉ Esp. grupoj, kiuj ne abonas la solan Esp. gazeton en Polujo kaj, kompreneble, la membroj de tiuj grupoj restas neinformitaj kaj neniel utilas al nia movado. Ĉu tiaj esperantistoj pretendas esti bonaj esperantistoj? Ne, karaj gesamideanoj, forjetu tiun indiferentecon! Estas vere ĝenerala krizo, sed ĉe bona volo ĉio estas ebla, trinku unu glason malpli da biero, fumu ĉiutage unu cigaredon malpli kaj oferu tiun monon por P. E., ĉar sen ofero nenja prospero.

Guste nun, kiam ni estas en preparo de plebiscito por enkonduki Esperanton en la lernejojn, subtenu Polan Esperantiston per abonoj, ĉar ĝi meritas tion kaj per tio vi plirapidigos la venkon de Esperanto, kiu furiĝos beno por la homaro. **Emil Kołodziej.**

KOMUNIKOJ DE P. E. D.

Respondante diversajn demandojn koncerne la sintenon de P. E. D. al la reorganiza demando, la Ekzekutiva Komitato de P. E. D. deklaras, ke la novekreita centra organizaĵo (U. F. E.) ne solvas kontingite la problemon. La Ekzekutiva Komitato bazante sin sur la decido de V. Polanda Kongreso de Esperanto en Lublin detenas sin aliĝi al U. F. E., konsciante ke ĝi neniel forigas la ĝisnunan kaoson regantan inter la centraj organizaĵoj. La E. K. konstatas, ke U. F. E. per sia konstruo ne trovis kaj ne povas trovi interkonsenton kun U. E. A., tial P. E. D. devas atendi ĝis kiam la situacio en la centro tiel klariĝos, ke estos ebla aliĝo al la organizaĵo sen malutilo por nia afero.

La Ekzekutiva Komitato konsilas do al la polaj samideanoj daŭrigi la ĝisnunan subtenon montritan al U. E. A. per aniĝado al tiu ĉi asocio.

La Ekzekutiva Komitato de P. E. D.

ORGANIZAJ DEMANDOJ.

El usono ni ricevis sekvantan cirkuleran leteron:

Al alilandaj esperantaj asocioj mi konsilas: Ne subskribu al la proponita Federacio (UFE). Estas absurde detrui asocion tiel gravan kiel UEA nur por provi, dekomence, alkreskigi samrolan institucion!

Estus pli logike kaj facile, PLIVASTIGI LA ROLON de UEA por permesi al tiu grava asocio (jam 25 jarojn la efektiva centro!) tuj ekfunkcii kiel oficiala centro — sen perdo de tempo, mono, materialo, simpatio kaj personaro! UFE postulas grandan subvencion por superflua, paralela institucio promesanta nenion novan! UEA, kun jam preta, jam funkcia, tutmonda organizo, bezonas nur la libervolan kunlaboron de la naciaj kaj fakaj societoj en siaj respektivaj kampoj! Plene kunlaboranta asocio sendube povus elekti anon al la UEA komitato.

UFE (per sia ekskluziva regularo) limigas la partoprenon en la internacia movado, kaj al multaj tute malebligas tion! UEA akceptas volonte IUN individualan esperantiston, sen konsidero pri nacieco kaj sen DEVIGO pri membreco en nacia asocio! En Usono nia nacia asocio pace kaj profite kunlaboris jam de 1928. Unu oficejo propagandas por la du asocioj. Ni retenas 10% de la UEA kotizoj por la nacia propaganda laboro. Tiu sumo ebligas al ni la eldonon de granda kvanto da luksa reklama materialo, kiu rapide progresigas la movadon en Usono!

Sincere la via!

Buffalo, N. Y. U. S. A., Januaro, 1933.

D. E. Parrish

Esperantisto de post 1908.

Nacia Sekretario de U. E. A., „Patrono“ de ICK 1925—1931, Propaganda Direktoro de EANA.

RESPONDE AL KELKAJ KURSGVIDANTOJ,

Post la Pola Esp. kongreso en Lublin mi interparolis kun fama Ĉe-metoda instruisto. Tiu plendis pri la malbona stato de la Esp. movado en Polujo kaj esprimis i. a., ke PED. estas nenia organizaĵo, ĉar ĝi ne kapablas salajrigi eĉ nur unu Esp. instruiston. Krome li pretendas, ke se ĉiu esperantisto pagus nur 10 gr. al PED., per tiu sumo la koncerna Esp. instruisto povus esti salajrata.

Bone! Do vi Esp. instruistoj kaj kursgvidantoj estas ja la solaj edukistoj kaj preparas, edukas la novajn adeptojn kaj nur de vi mem dependas via dezirata subteno. Do, ne kulpigu pro tio la Polan Esperanto Delegitaron!

Emil Kołodziej.

Kanto de l' fianĉino.

Tra la ĝardenoj kaj kampar' Jen estis nur kiso, jen estis kvant';
 La novajn florojn mi kolektis, Jen estis ameg' por mia amant'.
 Mi marŝis longe, longe, ĉar
 Plej belajn florojn mi elektis.
 Jen estis nur rozo, jen estis kvant',
 Jen estis florar' por mia amant'.
 Sed, k' al gut' altiras min,
 De roso sur la miaj floroj?
 Ĉu sur florar' de fianĉin'
 La roso falis aŭ la ploroj?
 Mi prenis florojn laŭ la vol' Jen estis nur larmo, jen est' s kvant';
 Tra la kamparo kaj ĝardenoj; Jen estas ĉagren pro mia amant'!
 Kun la siringoj kaj jasmeno.
 Louis Tiercelin.
 El la franca lingvo tradukis Lucien Thevenin V.-D-to de U. E. A. St.
 Etienne (Francujo).

Antoni Ossendowski.

„L' ARBAREGFANTOMO“.

Fine!..

Bolko elfalis el la klaso kor'doron, kiel bombo.

La partumoj, la historio kun geografio, la gramatiko, la poetoj — ĉio forpasis kaj povis nun dormi ĝis post la festo de „Tri Reĝoj“.

— Sed ĝis tiam estas ankoraŭ malproksime! — ekpensis Bolko kaj eksopiris pli libere.

Li sciis, ke antaŭ la loĝejo, kie li loĝis, staras jam la glitveturilo, jungita per „Bulaŭka“ kaj „Hrabina“, kaj dikvanga glitveturigisto, Adalbert, atendas la sin'oridon.

Bolko enmetis en tornistran la librojn, la poŝtmarkalbumon kaj la, neniam lin forlasantan, mallongan kaj larĝan tranĉilon, kiun uzas Delavaroj en amerikaj arbaregoj. Vere, la tranĉilo estas fabrikita el ligno, sed bele pentrita kaj arĝentita, aspektis, kiel plej vera delavara.

Ho! Ho! Kiaj skalpoj, talismanoj kaj insignoj de la estro kaj batalanto estas alpendigitaj al la prenilo!

Nenio miriga, ĉar tiu tranĉilo apartenis iam al Unkaso, la lasta estro de la noblaj Mohikanoj. Nune Unkason — Krzystek Chomicki'n — admiradis la gimnazio en Tarnovo, sed la tranĉilo restis ĉe la „blanka frato“ Arbaregfantomo, Bolko Wierzyński el gimnazio varsovia.

Ho! Malfacila afero!

La destino ofte disigas la plej bravajn batalantojn.

En la gimnazio estis multaj, famaj estroj de diversaj gentoj.

Siuksojn komandis „Nigra Vulturo“, Irokezojn — „Ruza Vulpo“, Vugusojn — „Leona Kolhararo“, sed Bolko — „Arbaregfantomo“ kun neniu estis amiko.

Li restadis sola, kiel plej vera „Arbaregfantomo“, pensplena, mistera, ne kaptibla, atenta je tio, ke ne fariĝu ia maljustaĵo al la malfortaj kaj por ke la kulpuloj ne restu malvenĝataj. Do li persekutis la perfidemajn. Siuksojn pro malhonesto atako de kvin el ili kontraŭ malforta Vuguso — Stach Korsak kaj en tiu persekuto li akiris honoran vundon — la kontuzan makulon sur la frunto; li helpis al pacemaj Vugusoj el enirklaso, kiam ili sekrete preterŝoviĝadis ĉe la unua klaso plenigita de batalavidaj Irokezoj, kio tamen ne malhelpis al „Arbaregfantomo“ savi la vivon al „Ruza Vulpo“, kiam „Sovaĝa Bubalo“ el reala gimnazio frakasis al Irokeza komandanto la nazon.

„L' Arbaregfantomo“ tiel pribatis la „Sovaĝan Bubalon“, ke li plorsorbante forkuris, kiel rapidpieda kapreolino.

Bolko, malgraŭ tio, ke li estis „Arbaregfantomo“, lernis bone.

Ĉar tiu mistera blanka homo memoris, ke la scienco aldonas la potencon, kaj la ne komparebla batalanto revis pri tio, por kunigi ĉiujn ruĝhaŭtulojn, doni al ili la sciencan kaj per ĝia helpo disbati la hispanajn konkerintojn — invadintojn, kiuj ekstermis milojn da malnovaj regantoj de Ameriko — la Indianojn.

Salutinte Adalberton, Bolko enkuris en sian loĝejon, rapide kunpakis en la valizon la vestaĵojn, tolaĵojn, tomahavkon, arkon kun saguĵo kaj bonan ateston, kiun li metis supren, adiaŭis la maljunan sinjorinon Kruszevska kaj elkuris sur la straton.

Kiam Adalbert lokis la valizon kaj tornistran, la glitveturilo glitis laŭlonge de la strato Aleje Jerozolimskie al la vojo Radomska.

Kvin miloj dividis la „Arbaregfantomon“ de la hejmo, sed „Bułanka“ kaj „Hrabina“ vivece kraĉspirante trotis rapide.

Vespere la batalanto estis jam hejme, ĝoje salutata de la gepatroj kaj pli juna fratineteto — Manjo.

Post la vespermanĝo li prenis el la ŝranko sian pafilon, pririgardis kaj ekpurigis ĝin, kalkulis restintajn ŝarĝaĵojn kaj diris al la patro:

— Paĉjo! Morgaŭ matene mi iros en la arbaran pafi la kornikojn. Amason da ili mi vidis dumvoje.

— Bonege! — respondis la patro. — Tiuj rabistoj alflugis sennombre, ili fortimigas miajn leporojn kaj perdrikojn!

— Mi jam montros al ili! — minacadis „Arbaregfantomo“ kaj la sekvantan tagon frumatene li elkuris en la kampon.

La kornikoj estis multaj, sed la saĝaj birdoj, vidante de l' malproksimeco la pafilon forflugis pli kaj pli malproksimen. La senlaca „Arbaregfantomo“ postsekvis ilin. Li iris tra la junarbeto, trakuris la kampon kaj preterlasante la arbareton, li ekstaris ĉe la rando de la ŝoseo.

„L' Arbaregfantomo“ ĉirkaŭrigardis.

La falkaj okuloj de la venkinto de „Sovaĝa Bubalo“ ekvidis solean figuron de nekonata knabino, kiu rapide iris de la preĝejo al la en malproksimeco videbla domo de gesinjoroj Marchlewski, bonaj kaj noblaj najbaroj.

La knabino estis evidente lernantino, ĉar tion indikis la lerneĉapeto. Si jus preterpasis la junarbaretan, kiam subite kun laŭta kriego elkuris el la „arbarego“ iu vila, terurega estaĵo kaj baris al ŝi la vojon.

— Grizli, terurega griza urso de Rokaj Montaroj — ekpensis „Arbaregfantomo“, premante pli forte la pafilon en siaj ŝtalaj manoj.

Sed baldaŭ li ekaŭdis, ke grizli kriegis:

— N-nu, silentu, fermu la buŝon!... tuj donu la monon, la palton, la bo-tojn... N-nu!

La atakanto komencis svingi per tuberrica bastono, proksimiĝante al la terurita lernantino.

La pensoj komencis rapide turniĝi en la kapo de l' „Arbaregfantomo“.

— Ĝi ne estas grizli... Jen certe la komandanto de la malkuraĝaj Majco-soj — „Ŝteliranta Jaguaro“, la danĝera malamiko de la sudaj Delavaroj...

Sed Bolko estis „Arbaregfantomo“ kaj la Unkaso de Tarnova gimnazio sciis, al kiu doni sian tranĉilon de estro.

La knabo rapidkuris al la atakita fraŭlino, eldonante militkrion.

La „Ŝteliranta Jaguaro“ rerigardis, kaj vidante alkurantan militiston kun karabeno, subite suprenvolvis la baskojn de la ŝafpelto kaj, saltinte trans la foston, enfalis en la arbustaron. Li forkuris, ke krakis en la arbareto.

— Mi estas „Arbaregfantomo“ diris Bolko, alproksimiĝinte al la lernantino. Blanka virino ne timu! La „Ŝteliranta Jaguaro“ forkuras nun kiel timema leporo. Mi akompanos la blankan virinon al ŝia vigrano. En kiu direkto de ŝia kolonio leviĝas la suno? Mi eltrovos la postsignojn kaj ni eliros kune sur la vojon de militistoj de gento, al kiu apartenas blanka virino.

La fraŭlino, iom pli maljuna ol „Arbaregfantomo“ trankviliĝis de la teruro kaj montrante antaŭ sin, respondis:

— Mi loĝas en Rolniki ĉe gesinjoroj Marchlewski. Mi alveturis al ili por Kristnasko. Mi estas kuzino de Julinjo.

„Arbaregfantomo“ jam sciis kion fari.

Li ektrovis sur la ŝoseo la bot-postsignojn de la fraŭlino, kiu iris al la pastro preposto pro la oblatoj, kaj akompanis ŝin ĝis la vojkurbiĝo, kiu kondukis al Rolniki.

— Mi restos ĉi tie, ĝis blanka virino atingos la vigranon kaj faros al mi la signon! — dĵris „Arbaregfantomo“ je la adiaŭo.

Li staris apoganta sin sur la fidela karabeno kaj atendis, rigardante la fumojn, ŝvebantajn super la vigvamo de la najbaroj.

Kiam „Arbaregfantomo“ ekvidis la de li savitan fraŭlinon, ŝvingantan per la tuko, li laŭ kutimo de noblaj indianoj levis la manon, kiel signo de adiaŭo kaj revenis hejmen.

Li nenion diris al la gepatroj kaj al Manjo, ĉar „Arbaregfantomo“ ne ŝatis la memlaŭdon.

En la ombro kaj silento li faris bonon al homoj malfortaj kaj supremataj. Sian aventuron li sciigis nur al Unkaso, skribante al li Tarnovon:

— Frato kaj amiko Unkaso, altranga estro de Mohikanoj kaj Delavaroj de la Ruĝa Rivero! Mi sciigas Vin, ke mi restas fidela al nia juro, ke ni estu ŝildo por la prenegataj kaj saĝo por la premegantaj. Hod'aŭ matene mi renkontis la komandanton de malkuraĝaj Majĉosoj de la prero Alabamo — „Ŝteliranta Jaguaro“; de l' embusko surfalis li, malkuraĝulo kaj trompisto, la sendefendan inon de la amika gento. Je la sono de mia milita krio kaj ekvidinte la brilantan, ŝtalan tubon de mia karabeno, la malamiko montris kalkanojn kaj malaperis en la densaĵo de l' arbarego. Mi ne povis sekvi lin, ĉar mi estis devigata trovi la vigvamon de la ino kaj enkonduki ŝin sur la vojon, kiu havas direkton al ŝia hejma fajrujo. Sur la tenilo de Via tranĉilo, kuraĝa Unkaso, blankiĝas nova surtranĉaĵo — signo de la atingita venko. La Granda Spirito gardu mian amikon Unkason, vivantan en la koro de

Arbaregfantomo,

batalanto kaj frato.

La letero estis sendata Tarnovon, sed hejme neniu sciis pri la apero de la terura „Jaguaro“ kaj venko de la „Arbaregfantomo“.

Sed en la tago de Novjaro, Bolko ricevis grandan skatolon volvitajn en la paperon kun surskribo:

Al brava batalanto — „Arbaregfantomo“

de la amika gento de Marchlewski.

„Arbaregfantomo“ kun tremantaj manoj disvolvis la paperon kaj malfermis la skatolon.

Kuŝis tie bela, tute nova dutuba paŭlo de 24 kalibro, leda zono kun ŝarĝaĵoj, en ora bindo. „La lasta Mohikano“ de genia Fenimore Cooper kaj blua, silka rubando kun brodataj vortoj:

Al sentima, nobla defendinto por la memoro

de Zonjo.

„Arbaregfantomo“ staris mirigita, nekredante al siaj okuloj.

— Brave Vi faris, mia knabo, defendante la inon kontraŭ tiu vagulo, diris la patro kaj manrapetis lin je la ŝultro.

— Li estis la „Ŝteliranta Jaguaro“ — flustris la batalanto. — Tamen tiu malkuraĝulo ne estas inda renkontiĝi kun amiko kaj frato de Unkaso...

— Mi komprenas — rediris la patro. — Sed kial vi nenion diris pri la okazintaĵo?

— Nenio estis en ĝi eksterordinara! — diris „Arbaregfantomo“. — Mi agis tiel, kiel ni juris al ni kun Unkaso, kiel mi agis defendante la malgrandan Vuguson kontraŭ la atako de la „Sovaĝa Bubalo“ kaj kiel mi agos dum la tuta vivo...

— Tre bone „Arbaregfantomo“! — ekvokis la patro kaj subite komencis froti siajn okulojn per la tuko, kion li neniam antaŭe faris, kaj lian ekzemplon sekvis la patrino, kiu ridetis plorante.

Tradukis el, la pola: W. Krzysztofiowicz, Bydgoszcz.
FINO.

MIA PER- KAJ POR- ESPERANTA VOJAĜO AL NORVEGUJO.

Kiam, antaŭ du jaroj, mi komencis studi esperanton, mi tute eĉ ne pensis, ke post tiom mallonga tempo mi faros iun praktikan uzadon de tiu lingvo. Mi komprenis bone, kiajn profitojn kaj utilojn donus esperanto, se ĝin komprenus ĉiuj, sed mi opiniis, ke en nuna tempo ĝi estas nur abstrakta ideo. Mi kaj aliaj ĝesamideanoj penas enkonduki esperanton en la vivon, sed ĝia praktika aplikado

venos en estonteco. Sed mi baldaŭ sangis la opinion. Tre multe influis tiun ŝanĝon korespondado kun alilandanoj.

Inter aliaj landoj mi elektis por korespondado Norvegujon kaj tiamaniere komencis korespondi kun s-no Margaretha Almquist. Malgraŭ granda diferenco de la aĝo, mi trovis en ŝi la plej bonan kaj sinceran amikinojn. Ŝi vizitis Krakovan kongreson, sed mi bedaŭrinde ne povis ŝin akompani. S-no Almquist dum ŝia restado en Polujo vizitis ankaŭ Vilnon kaj tiam invitis min Norvegujon. Sed mi respondis, kompreneble, ke tiu vojaĝo estas por mi tro multekosta kaj mi ne povas ĝin fari.

Tamen ankoraŭ Hamlet diris, ke okazas en la mondo faktoj, pri kiuj eĉ filozofoj ne song'as. En komenco de junio 1932 mi subite ricevis, dank' al rekomendo de s-no Almquist, inviton al Norvegujo de Norvega Esperantista Ligo en Oslo. Oni petis min fari en kelkaj norvegaj urboj prelegojn pri Polujo. Tiamaniere mi povis malmultekoste fari vojaĝon, ĉar mi devis pagi nur vojaĝkostojn ĝis Oslo kaj reen. Mi preskaŭ ne kredis, ke estas vero. Mi do neniam eĉ revis pri vojaĝo Norveglandon. Tamen ankoraŭ restis grava malfacilaĵo, ŝajne ne forigebla. Eksterlanda pasporto kostas ja tiom multe! Mi ne povis elspezi 400 zlotojn por pasporto! Kion fari? Mi estis preskaŭ certa, ke la registaro ne helpas al mi en miaj klopodoj, sed kuraĝeco estas patrino de sukceso kaj mi certigis pri tio, kiam mi post longaj penadoj ricevis senpaŝan pasporton. Tio montris al mi bone, ke la pola registaro ne ignoras signifon de esperanto.

Do mi jam povis veturi kaj 30 de junio mi forlasis Vilnon. Estas nur unu epizodo en mia vojaĝo Norveglandon, pri kiu mi deziras al vi rakonti. Kiam mi estis en Germanujo, mi parolis germane kaj mi pensis, ke en Svedujo kaj Norveglando mi ankaŭ povos uzi la germanan lingvon. Ĉiuj certigis min, ke svedoj kaj norvegoj bone min komprenos. Do mi ne skribis al delegitoj, por ne fari al ili sen necesajn klopodojn. Mi sidis tute trankvile sur ferdeko de granda vaporŝipo, kiu veturigis pasaĝerojn de Sasm'tz al Trälleborg. Fine mi venis al sveda urbo Trälleborg. Ĉiuj pasaĝeroj malsupreniris. En interno de la vaporŝipo staris vagonaro. Oni nin ĉiujn sidigis en vagonaron kaj forveturigis al stacidomo, troviĝanta tuj ĉe la haveno. Mi restis sen mia pakajo kaj mi tuj rimarkis, ke mi prenis malĝustan vagonaron, veturontan al Stockholm. Ĉe la stacidomo mi prenis alvoki pakajportiston kaj klarigi, ke li devas havigi mian pakajon el vaporŝipo kaj trovi ĝustan vagonaron. Sed, ho ve! Neniu min komprenis, nek pakajportistoj, nek fervojoficistoj, nek pasaĝeroj. Felice unu el fervojoficistoj fine komprenis miajn malesperplenajn gestojn kaj sendis al mi vaporŝipan pakajportiston. Mi rehavis la pakajon kaj prenis lokon en ĝusta vagonaro unu minuton antaŭ la forveturo. Kaj ĉiuj miskomprenoj kaj mia tragikomediasituaĵo havis nur unu kaŭzon: manko de internacia komprenilo. Se ĉiuj fervojistoj parolus esperantlingve, mi povus veturi sen iu malagrablo.

La 3-an de julio mi venis Oslon. Tie mi restis nur kelkajn tagojn, dum kiuj mi konat'igis kun norvegaj esperantistaj „eminentuloj”. Baldaŭ mi forveturis en pluan vojaĝon, en automobilo, kune kun s-no Almquist, ŝia parenco juna s-ro W. K., kaj unu dana samideano, Erik Pedersen. Ni veturis al urbo Mandal tra multaj valoj kaj montoj, laŭ la bordoj de verdaj fiordoj kaj bluaj lagoj, sub kaj inter minacaj, nudaj rokoj, apenaŭ kovritaj per verda musko aŭ per blanka neĝo, brilanta en la radioj de somera suno. Ni veturis tra grandaj densaj arbaroj, admiris multajn belajn akvofalojn, dormis en puraj kaj modestaj kamparnoktejoj kaj mang'is simplajn kamparajn manĝaĵojn. Ni vidis vilaĝanojn en iliaj naciaj vestoj, ĉe la preĝejoj, dum laboro. Kaj fine ni venis al celo de nia vojaĝo, malgranda, sud-norvega urbeto, Mandal, en kies ĉirkaŭaĵoj lokiĝis tiutempe granda norvega skolta tendaro. Ni loĝis kelkajn tagojn en malgranda, blanka, tipe sud-norvega dometo kaj ĉiutage vizitadis tendaron, kie troviĝis, krom norvegaj skoltoj, reprezentantoj de multaj landoj, ankaŭ de Polujo. Inter aliaj troviĝis tie, kiel reprezentanto de Hungarujo, konata esperantisto, d-ro Ottmar Fischer, Ĉe-instruisto. D-ro Fischer venis Norvegujon antaŭ du jaroj kaj ĝis nun faras en multaj norvegaj urboj multenombrajn esperantajjn kursojn. Ankaŭ en Mandal li gvidis Ĉe-kurson por 75 skoltoj, malgraŭ, ke skoltestro estis kontraŭulo de esperanto, kaj mokis knabojn, kiuj vizitis kurson.

En tendaro ni trovis esperantistojn inter knaboj kaj ilia estraro kaj ni

bone amuziĝis en internacia societo dum kelkaj tagoj. Post la forveturo de skoltroj ni ankaŭ revenis Oslon, sed nur restis tie unu tagon. Baldaŭ mi veturis per fervojo al urbo Hamar, kien mi estis invitata por fari prelegojn. Hamar estas nomita „la koro de Norveĝujo“ kaj ĝi estas ankaŭ „la koro de Esperantujo“ en Norveĝlando. Antaŭ du jaroj, kiam venis ĉi tien d-ro Fischer, estis en Hamar nur unu esperantisto, inĝeniero Kleven, kaj nun estas 125. Ĉar la urbo estas malgranda kaj havas nur 6 milojn da loĝantoj, sekve ĝi havas 2% da esperantistoj, kaj Oslo havas nur 500 esperantistojn, kaj 260.000 da loĝantoj.

En Hamar mi ricevis tre interesan loĝejon. Hamar kuŝas en la valo ĉe la plej granda norvega lago, Mjöse, kiu havas 112 kv. km. kaj etendiĝas de Oslo ĝis Lillenhammer. Sed ni ne restis en la valo. Ni veturis per aŭtomobile supren kaj venis al malgranda dometo, troviĝanta sur la monto, 600 metrojn super la marnivelo. Ĝi estis konata inter norvega esperantistaro „Dometo de la masonisto“, konstruita speciale por esperantistoj. Masonisto mem estas tre konata en Hamar kaj oni adresas al li leterojn: Hamar, masonisto (esperantisto). Preskaŭ neniu memoras, ke lia vera nomo estas ne masonisto, sed Johanesen. Malgranda ejo, kiun li konstruis por siaj samideanaj geamikoj, havas nur unu grandan gastejon kaj kuirejon malsupre, kaj unu dormoĉambron supre. Super la pordo estas videbla surskribo: „Bonvenon“ kaj sur la tegmento flirtas la verda standardo. Sur la muroj da la kabano troviĝas multaj belaj poŝtkartoj el diversaj landoj. Sur la tablo kuŝas granda libro kun subskriboj de vizitantoj. Mi devas aldoni, ke esperantistoj ricevas tiun loĝejon tute senpage. Do ni, kvar virinoj, okupis tian solecan dometon por kelkaj tagoj. Ĉiutage venis al ni gastoj de Hamar per aŭtomobile aŭ per piede (10 kilometroj por Norveĝoj nenion signifas) kaj ni kune amuziĝis ĝis malfrua vespero. Dum tago ni kuŝis en ĝardeno kaj rigardis beleĝan perspektivon aŭ iris promeni en pantalonoj kaj botoj supren, en la montojn. Vespere ni hejtadis en kamenteno, ĉar vespere en montaro estis malvarme, kaj babilis aŭ kantis. Tiamaniere ofte pasigas Norveĝoj sian libertempon en la montoj. Mi vojaĝis ankaŭ kun s-ro Almquist al proksima urbo Lillenhammer, kie ni rigardis tre interesan muzeon. Post prelego, kiun mi faris en Hamar, ni revenis Oslon. Tie mi faris kelkajn prelegojn: unu grandan kun lumbildoj por ĉiuj kluboj, du en Laborista Klubo, unu por Laborista Junulara Ligo, por ne-esperantistoj, tradukita en norveĝan lingvon dum mia prelego kaj kelkajn malgrandajn dum kunsidoj de neŭtrala klubo. Pri la prelegoj anoncis gazetaro kaj unu el grandaj norveĝaj gazetoj aperigis artikolojn pri prelegoj de alilandanoj en esperanto. Krom mi, estis ankoraŭ en Oslo du germanoj kaj unu svedo ni faris unu komunan vesperon de alilandaj samideanoj.

Nun mi iomete rakontos al vi pri miaj turistaj impresoj. Ĉu vi scias, kiamaniere vojaĝas turistoj eksterlande? Veraj, tipaj turistoj havas gvidlibron, kie ili trovas la nomojn de urboj, muzeoj, preĝejoj k. t. p. Ili veturas do de hotelo X. en urbo Y. al hotelo W. en urbo Z. kaj restas en ĉiu urbo kelkajn tagojn rigardante ĉion rimarkindan laŭ la gvidlibro. Ĉu tiamaniere ili vere konatiĝas bone kun la lando, en kiu ili veturas? Certe ne! Ili vidas la panoramon de la urboj, ili vidas la muzeojn, similajn en ĉiuj landoj kaj ili forveturas trankvile hejmen, ĉar ili vidis jam ĉion, kion priskribas la gvidlibro. Tute alie mi veturis. Dank' al esperanto mi loĝis en norvega hejmo, kun norvega familio kaj laŭ norvega maniero. En Oslo mi restis dum pli ol du semajnoj. La urbo estas tute moderna kaj sufiĉe vigla, malgraŭ malgranda nombro da loĝantaro. Estas tie 5 esperantistaj grupoj: Neŭtrala Klubo, Laborista Klubo, Tramista Klubo, Policista Klubo kaj Komunista Klubo. Ekzistas ankaŭ infana klubo, kies prezidanto havas nur 14 jarojn kaj estas fervora esperantisto.

Kompreneble mi ankaŭ vizitis en Oslo kelkajn muzeojn. Tio estas do neevitebla devo de ĉiu turisto. Sed kelkaj estis vere interesaj. Mi vidis muzeon de Amundsen, malnovajn vikingŝipojn kaj belan muzeon en Būgdō.

En la lasta loko estas konstruitaj en la parko diversaj kamparaj domoj, kies aspekto ekstere kaj interne estas tute la sama, kiel en aŭtentikaj kamparaj kabanoj en diversaj valoj.

Mi vidis belan belartan muzeon, la tombojn de Ibsen, Björnsterne-Björnson, Wiegeland... Tio estis oficialaj vidindaĵoj, rigardataj de ĉiuj turistoj. Sed mi vidis ankaŭ tion, kion aliaj turistoj ne rigardas. La inspektorino de ĉefa popol-

lernejo en Oslo, f-no Bye, estas esperantistino kaj ŝi montris al mi mondkonatan, modernan popollernejon. Mi vidis ankaŭ grandan, belegan maristan lernejon, laboristan popolan domon... Mi vizitis multajn miajn esperantistajn geamikojn en iliaj hejmoj kaj vere konat'gis iomete tiamaniere kun la vivo de norvega popolo. Mi lernis diri „dankon pro la lasta“ tuj post „Bonan tagon“ kaj mi atendis post manĝado la demandon de mastrino: „Ĉu vi estas kontenta?“, por respondi kiel vera norvegino: „Jes, mil dankojn, mi estas kontenta“. Mi alku-timiĝis al ŝlentamaj sinjoroj kun nepraj pipoj en la buŝo, al fortaj, sportemaj, neŝmiritaj per ruĝigilo kaj pudro, fraŭlinoj, kiuj lute ne flirtis.

Mi manĝadis treege maldikan kaj sekan panon kun ŝafa kolbaso kaj bruna fromaĝo, la balenan viandon aŭ marajn fiŝojn kaj bestojn. En dometo de la masonisto en Hamar vespere, ĉe kameneto mi aŭd's norvegajn fabelojn pri trolloj kaj fantomoj, kaj multajn rakontojn pri vintra skiado kaj vintraj skivojaĝoj. Preskaŭ ĉiutage mi iradis en pantalonoj kaj grandaj botoj promeni en la montojn kaj vidis multajn homojn de diversa aĝo kaj de ambaŭ seksoj, kiuj loĝis en tendoj kaj aŭtomobiloj ekster la urboj aŭ piediris kaj biciklis en montaron kun grandaj, pezaj sakoj surdorse.

Nun mi nur rakontos pri mia revojaĝo hejmen. Dumvoje mi haltis en Kopenhago. Mi sciigis pri mia alveno tiun danan samideanon, kiu faris kune kun ni la automobilvojaĝon tra Norvegujo. Tio sufiĉis. Li atendis min kune kun alia s-no, s-ro Jahn kaj ni traveturis en aŭtomobilo de tiu ĉi lasta sinjoro la tutan urbon kaj eĉ ĉirkaŭaĵojn. En Kopenhago mi ne iris tagmanĝi inter internacie aspektantaj hotelmurcoj, similaj en la tuta mondo, sed mi tagmanĝis en simpla laborista familio de s-ro Jahn, kiu estis treege afabla kaj gastema. Poste mi jani veturis tra Stettin kaj Gdynia al Wilno.

Tiamaniere mi faris mian per- kaj por esperantan vojaĝon kaj konstatis, ke jam nun esperanto bone taŭgas por la turismo. Pli multe: tiu turismo ne estas simpla. Oni konatiĝas kun la lando, kiun oni vizitas multe pli bone, ol se oni veturas sen esperanto. Mia vojaĝo montris al mi, kiom multe signifas, esperanto por rilatoj inter diversaj nacioj kaj por ilia interkonatiĝo. Oni povas per helpo de esperanto detruiri barilojn, kiujn konstruas la ŝovinismo. Kaj kiam oni pripensas, ke lio estas nur malgranda parto de profitoj, kiujn povas doni al ni esperanto, oni estas vere dankema al ĝia granda Kreinto.

E. Szyndelman.

IMRE UNGAR — KOLA AJAYI.

En bela salonego de Malnova Teatro en Kraków ludas Imre Ungar. Simpla nomo, antaŭ unu jaro preskaŭ nekonata, kaj nun — aŭreolo de eŭropa gloro brilas super ĝi.

Dank' al pola esperantistaro ĝenia, blinda pianisto el Budapeŝto venis al Varsovio, por partopreni en Chopina - konkurso, kaj li ricevis la unuan premion. La tuta mondo povas nun admiri lian ĝenian muzikon.

La juneco de Imre Ungar estis konstanta batalo kun la sorto en mizero kaj plej malbonaj vivkondiĉoj. Kaŭze de iu grava malsano li perdis la vidpovon jam en la dua vivjaro kaj neniam plu li ekvidis la sunrad'ojn.

Por ni, vidantaj homoj, neimaginebla estas la giganta laboro de nia ĝenia samideano. Li ekzercas kaj studas legante la notojn per unu mano, por ilia konduko sur konvexaj notoj, per la dua interlude sur la klavaro, poste inverse, por tiamaniere ĉe absoluta aŭdsento, fenomenona muzikeco kaj al nekonata ebleco de koncentriĝo ekzerci per du manoj. Iu poste ludas al li la komponon, kiun li, ekkaptante per sia mirinda memorkapableco, pliprofundigas pere de individua interpretado. Chopin estas lia plej amata komponisto kaj li ludas liajn komponojn vere majstre. Kiam li ludas, oni devas kompari lin senvole kun la plej granda muzika geniulo de l' mondo — Bethoven rilate al la sama majstreco de pure teknika flanko, koncerne la eksteriĝadon de iliaj spiritkapabloj, kaj koncerne al la kreadfortoj de Bethoven kaj rekreadtalento ĉe Ungar. La klavaro fariĝis preskaŭ parto de organismo ĉe Ungar, kiu regas ĝin kun preskaŭ lunatika certeco.

Ni havis antaŭ ni tute maturan arliston malĝraŭ liaj 23 jaroj, kiu scipovas

alparoli per sia ludo al plej profundaj kasejoj de nia animo kaj kortuŝi ĝislarme per kora, plej ofte malgaja poezio de sia escepte animplena, tute ne sentimentala, vira kaj laŭbezone heroa, fanfara interpretado. Providenco Dia v'oble re-kompencas al nia fama samideano la malfeliĉan kriplecon per paradizo de artistaj ekstazoj, dum kiuj li forgesas pri sia malfeliĉo.

Kaj ni travivis neforgeseblan momenton, kiam post la koncerto dum longedaŭraj aplaŭdoj nia kara, estimata prof. Odo Bujwid enkondukis la blindan artiston sur scenejon, alparolante lin per kortuŝaj vortoj:

„Ni havas antaŭ ni artiston de Dia Graco kaj ni dankas al li pro lia majstra ludo — li plej ofte donu al ni okazon aŭdi ĝin.

Preskaŭ samtempe gast's en Krakovo simpatia samideano, negro el Nigero en Afrika, sinjoro Kola Ajayi. Lia publika prelego en tutplena aŭlo de la VIII-a gimnazio kaj koncerto de negraj kantoj kun akompano de originalaj negraj muzikinstrumentoj est's tre interesaj. Speciale en lernejoj li tre rapide akiris la korojn de malgrandaj aŭskultantoj, parolante pri negra vivo kaj kutimoj — „forte, kuraĝe kaj elegante“, kompreneble pere de „aparato“. Finante siajn paroladojn li esprimis esperon, ke dum sia dua vizito en nia urbo li tiun ĉi „meblon“ ne plu bezonos.

Post la koncerto de Imre Ungar okazis en kafejo miniatura „mondkongreso“ — la hungara blinda artisto, nigra preleganto el Afriko kaj Krakovaj gesamideanoj. Ekestis originala disputo. „Ĉu la negroj aranĝas en Lagos koncertojn?“ Ne, nur ĝazbando estas tie moda.

„Bedaŭrinde, do mi ne povos koncerti en Afriko“ respondis Imre Ungar. Kaj ĉiuj ridis, trinkis teon kaj parolis — esperante. N. Bertizanka.

POLLANDA KRONIKO.

KRAKÓW. „Societo Esperanto“ plivigliĝis lasttempe la esperantan movadon en Kraków. — Ĝis nun okazis jenaj prelegoj: „Niaj planoj por estonteco“, s-ano Ortsmann. „Rememoroj el gimnaziaj tempoj“ — s-ano Lichtenstein. „La novaj polaj libroj“ — s-anino I. Szczepańska. „Propaganda vojaĝo de s-ano Kola Ajayi en Polujo“ — s-ano Zajaczkowski. Komune kun „Pola „Esperantista Klubo“ „Societo Esperanto“ aranĝis la 14-an de februaro prelegon de negro s-ano Kola Ajayi. La 20-an de februaro okaz's en salonoj de popola domo „Wisła“ Radziwiłowska 23 je 8-a vespere danckunveno.

Dum la Ĝenerala Kunveno de Soc. „Esperanto“ (okazinta en januaro k. j.) oni elektis jenan Revizian Komisionon: ges-anoj Weinsberzanka, Bertizanka kaj Wiesenberger. Detaloj pri la Kunveno en januara n-o de „Pola Esperantisto“.

En aŭgusto p. j. gastis en Kraków dum kelkaj tagoj ĵurnalistoj, sam-ano Josef Matyas el Debreczen. En societo de inĝ. Gostyński, del. Wiesenberger kaj Dro Ziomek li vizitis la plej interesajn vidindajn. Reveninte hejmen s-ro M. priskrib's en grava hungara ĵurnalo „Debreczen“ en n-oj de 25/12. 1. k. 8. p. m. en 3 longaj preskaŭ tutpaĝaj artikoloj la vidindajn k. historion de nia urbo — ĉion kun vortoj de admiro. La Krakovaj esperantistoj sur t'u vojo dankas al samid. Josef Matyas por la bonfama priskribo de nia urbo.

KRÓLEWSKA HUTA. Rondo Esperantista aranĝis la 8. I. sian ĝen. kunvenon. La malnova estraro estas reelektita. Prez.: E. Kolodziej; vicpr.: B. Gerlich; sekr.: Weihs; kas. Plona; anstataŭanto: Kornelius; bibl.: Jonca; rev. kom. Goliński, Sadło, Tyła; konsilantoj: S-ro D-ro H. Broder, H. Klyk.

En 1932 estis aĉetataj Esperantistoj por nur 250 zlotoj, dum en 1931 por 478 zlotoj. La Rondo nombras nur 27 membrojn por aliĝo de kelkaj anoj al nove fondita Esp. - grupo aliloka.

LUBLIN La judaj Esperantistoj en nia urbo, organiziĝis kiel aŭtonomia sekcio ĉe la Juda Landkonema Societo. Je komenco de sezono ni aranĝis Esperanto-Kurson, gviditan de S-ro M. Tuler. La 25-an de decembro okaz's solena fermo de la kurso. Finis ĝin 12 personoj, kiuj jam aniĝis al nia movado. La 24-an de decembro ni aranĝis sub gvidado de S-ro Tuler senpagan propagandan lecionon laŭ la rekta metodo. Ĝi kunveniĝis 60 personojn kaj ĝi estis sukcesa. En rezulto ni organizis duan kurson ankaŭ sub gvidado de S-ro M. Tuler, laŭ jam komenciĝis la 17-an de januaro.

Krom tio ni aranĝas 2-foje semajne konversaci-vesperojn, kiujn partoprenas 20—30 anoj (entute nia sekcio nombras 60 membrojn). — Estas ankaŭ projektata aranĝo de perfektiga kurso gvidota de S-ro M. Tuler. — Nia ejo troviĝas ĉe la strato Staszica 22/14. Eksterurb- kaj landanoj estas gasteme akceptotaj.

POZNAN. La 15. V. 1932. fendiĝis en Poznań „Poznana Esperanta Klubo“, kiu aranĝis unu esperantan kurson. La kunvenoj okazas ĉiusemajne ĵaŭde je la 8 h. vespere en kafejo „Faugrat“, al. Marcinkowskiego 8. S-ro prof. Olszowski oferdonis al la klubo sian privatan esp.-bibliotekon. Dank' al kelkaj sciigoj en la gazeto „Dziennik Poznański“ la nombro de membroj pligrandiĝas.

RADOM. Ĉe la Kultur-Kleriga Rondo estas organizita Esperanta Sekcio, kiu aranĝis la kurson konsistantan el 40 lernantoj. Gvidis ĝin s-ro Misiewicz. La 18-an de decembro 1932 j. estis aranĝata Esperanta Vespero, kiun partoprenis 50 personoj, kun sekvanta programo: 1) La solenan vesperon malfermis s-ro Wrzesień Franciszek. 2) Kanto de himno „Espero“. 3) Ĉirkonstancaj paroladoj pole s-ro Dolecki, esperante — s-ro Wojtas. 4) Deklamoj pole kaj esperante s-rino Dolecka kaj s-ro Palczewski. 5) Finiĝis la bela vespero per unisona kanto „Tagiĝo“ de Grabowski. Post la supremenciita vespero estas aranĝita supera kurso, kiun gvidas s-ro Wojtas Jan.

WARSZAWA. En „Głos Nauczycielski“ fakorgano de instruistoj, aperis artikolo pri Esp. Verkis ĝin s-o Kroeber, prezidanto de TAGE. Reprezentanto de tiu asocio en Polujo estas s-o B. Gluchowski, Warszawa, Wybrzeże Kościuszkowskie 35. Ĉiuj instruistoj estas petataj aliĝi.

Fondiĝis „Socialista Esperanto-Societo en Pollando“. Poŝta adreso: Warszawa, Marszałkowska 81, advokato J. Litauer (tel. 9.44-74 de 17.30 ĝis 19 horo).

La societo jam komencis sian agadon per aranĝo de kursoj, prelegoj kc. Fondintoj de la Societo estas Litauer, Bugajski, Hartman kaj Murkowski, kiuj forlasis la Laboristan Esp. Asocion „Laboron“.

WILNO. La E-klubo de Vilna Juda Kleriga Societo „Vilbig“ renoviĝis sian agadon post la someraj monatoj de 1932. Por partopreni la Lublinan Kongreson la Klubo delegis s'an gvidanton K. Geršater, kiu reveninte Vilnon en novembro raportis pri la Kongreso en la salono de „Vilbig“ antaŭ kelkcentpersona aŭditorio. Nia s-ro K. Geršater (preskaŭ la plej malnova Vilna esperantisto) antaŭ ok monatoj estis invitata de la ĉi-tiea ĉiutaga gazeto „Wilner Tog“ por redaktadi konstantan „Esperanto-Fakon“, aperantan ĉiusemajne. Komence li donis en la „Fako“ tutan kurson de E. Aperis ĉiam 18 lecionoj. De nun estos aperigataj diversaj kronikoj kaj informoj de la E-movado. — En tri grandaj artikoloj en la s. n. gazeto s-ro G. priskribis la Lublinan Kongreson. — La 16. XII. nia klubo aranĝis solenan vesperon pro la naskiĝtaga datreveno de la Majstro. En la oficiale solena parto prelegis: K. Geršater — s. t. „Dro Zamenhof kaj lia senmorta verko“ kaj Prof. D. Fajnsztejn — s. t. „La jaro 1907 en la vivo de Dro Zamenhof“. Poste deklamis „La vojo“ — Fno. B. Kosowska. Versaĵojn de K. Kalocsay deklamis „Sultkult“-ano Suster. La mandolina, orkestro de „Vilbig“ kunhelpis la amuzan parton, daŭrintan ĝis la 3 horo postnoktmeze

Vilbigano.

Intencante aperigi kolekton de
POLAJ POPOL - KANTOJ

kun muzik - notoj

mi serĉas bonajn esperantajn tradukojn. Bonvolu afable sendi al mi viajn tradukojn, se eble, kun la muziknotoj.

Kun sincera antaŭdanko
117, Bd. Jourdan. Paris 14-e.
S. Grenkamp

ENCIKLOPEDIA VORTARO ESPERANTA-POLA.

La eldonejo „Hawu“ en Warszawa intencas eldoni la enciklopedian vortaron esp. — polan de M. Guterman. Tiucele ĝi anoncis subskripcion por tiu ĉi verko, kiu aperos en kafejoj. La ultimato de la eldonejo estas, ke estu nur 200 abonantoj. Ĉar nun jam multaj polaj esperantistoj ekinteresiĝis pri tiu eldono, mankas nur malmultaj al tiu ĉi nombro. Skribu ĉiuj al la eldonejo „Hawu“ Warszawa, Bielańska 5, petante prospektojn aŭ deklarante ekabonojn al tiu ĉi verko. La apero de tiu necesa vortaro progresigos nian movadon en Polujo.

Pollanda Esperanto Delegitaro.

LA LEIPZIG-A PRINTEMPA FOIRO 1933.

Por la Leipzig-a Printempa Foiro (Komenco 5. III. 33) kaj la kun ĝi ligitaj Foiroj por Tekstaj, Mebloj kaj Sportartikloj kaj la aliaj branĉoj de la Generala Specimenfoiro kaj la grandaj Foiroj por Tekniko kaj Konstrufako jam anoncis sin granda nombro da negermanaj eksterlandaj ekspozantoj. I. a. Italujo sub la ĝvidado de la „Istituto Nazionale por l' Esportazione" (Romo) partoprenos kun granda kolektiva ekspozicio. La Italaj ekspozantoj montros ĉiuspecajn produktojn de sia lando, industriproduktojn, nutraĵojn, krudan materialon diversspecajn. Ankaŭ la partopreno de Japanujo en kolektiva ekspozicio estas garantiata. Plue ekspozos Danujo, Francujo, Anglujo, Hispanujo, Hindujo, Finnlando, Norvegujo, Jugoslavio, Rumanujo, Hungarujo, Argentino, Brazilio kaj Meksiko. Aŭstrujo kaj Ĉeĥoslovakio ekspozos laŭ ĝisnuna kutimo en propraj foirdomoj. Kiel dum antaŭaj foiroj apud la kolektivaj ekspozicioj multnombraj eksterlandaj firmoj estos reprezentataj en la ekspozicioj de diversaj branĉoj

RICEVITAJ GAZETOJ.

Literatura Mondo. Monata Revuo. Dua Periodo dua jaro. Ĉefredaktoro: K. Kalocsay Budapeszt IX Mesterutca 53. V. 7.

Esperanto. Internacia Revuo eldonata de Univ. Esp. As. Geneve I Tour de L' Ile Svislando.

Heroldo de Esperanto. Semajna organo de la Esp. Movado. Ĉefredakt. Teo Jung. Kolonjo (Köln am Rhein) Germanujo.

La Movado. Monata Gazeto. Oficiala Org. de la Franca Societo por la propagando de Esp. Red. Fondinto Emile Houbart, Paris 2 rue Richelieu 104.

Germana Esperantisto. Monata. Respondeca Redaktoro G. Habellok. Red. Deutscher Esper. Bund. Berlin SW. 61 Planufer 28.

Nederlanda Esperantisto Org. de Nederl. As. La Estonto Estas Nia. Red. P. W. Baas. 2 Boerhaave straat 7. Amsterdam.

La Espero. Svenska Esp. Tidningen. Red. Bernhard Eriksson Biblioteksgatan 30 Stockholm.

Belga Esperantisto. Monata Revuo. Of. Org. de Belga ligo Esperant. Dir. Frans. Schoofs Kleine Hondstraat II Anverpeno.

Austria Esperantisto. Of. Org. de Austria Esp. As. Red. Wien I. Neue Burg.

Norvega Esperantisto. Org. de Norvega Esp. Ligo. Red. Konsulo Alf Christensen Bergsl. enstgt. I. Oslo.

Esperantistul. Dir. D. Crutiu — Delasaliste Strada Scarlat Varnav. N. 67 Constanta. Rumanujo.

L' Esperanto. Redakcio: Torino via Goffredo Casalis 25. Italujo.

Lingvo Internacia. Dir. Dro Anakreon Stamatiadis St Rodou 21 Ateno Greklando.

Dansk Esperanto Blad. Centra Dana Esp. Ligo. Red. Mart'n Palsberg Nyborg gade 3 Aarhus Danlando.

Ondo de Daŭgava. Monata. Latva Esper. Societo. Resp. Red. Tupicin. Riga Posta kaste 844. Latvio.

Informoj. Esperanto As. de Estonio Resp. Red. R. Tiik k. Tallin postkast 6. Estonio.

La Suda Stelo. Org. de Esp. Movado en Jugoslavio Red. Franjo Homar Slavonski Brod. Zagreb.

Bulgara Esperantisto. Bulgara Esp. As. Sofio Poŝkesto 233.

Hispana Esp. Gazeto. Of. Org. de Hispana Esp. As. Red. Sagasta 10 Madrid.

Kataluna Esp-o. Monata Gazeto. Org. de Katal. Esp. Federacio kaj de intern. Floraj Ludoj. c. Valenc'a 245. Barcelona.

La Nova Epoko. Literatur - Scienca Aldono al Sennaciulo aperas dumonate 14 av Corbera Paris 12e.

Laborista Esperantisto. Red. Middenveg 226 Amsterdam 80.

Arbeiter Esperantist. Esp. As. Por Germanlingvaj regionoj. Berlin C. 25 Dirksenstr. 42.

La Socialisto. Org. de Austria Laborista Ligo Esp. Wien XXI, Angerer-str. 14.

Norda Gazeto. Red. E. Deligny. rue Allan 4. St. Omer Francujo.

Ligilo. Monata Esp. Gazeto por Ĉeĥoslovakoj Resp. Red. Fr. Heikenwälder Prostejov Masarykovo nam. 33 Ĉeĥoslovakujo.

Internacia Medicina Revuo. Monata. Of. Org. de Tutmonda Kuracista As. T. E. K. A. Cefred. Prof. Vanverts Lille. Red. 19 Avenue Montjoie. Uccle 3 Belgujo.

Intersteno. Monata Gazeto Ofic. Org. de la Tutmonda Intersteno Asocio (Internacia Stenografio). Red. Fr. Graser Karl — Fleischstr. 3 Frankfurt a. M. Germanujo.

Interligilo de P. T. T. Centra Organo de Fakinformoj. Monata Red. Petro Filliatre 324 rue Lecourbe Paris XV.

Espero Katolika. Internacia monata gazeto Ofic'ala Organo de la Internacia Katolika Unuigo Esperantista (I. K. U. E.) Red. Pastro Font Giralt. Prov. de Gerona. Collel Hispanujo.

Internacia Pedagogia Revuo. Of. Org. de Tutmonda As de Geinstruistoj Esper. T. A. G. E. Red. Dro Kurth Riedel am Fuchsberg 2 Dresden A. 20 Leubnitz Neuostra.

Aŭroro. Societo de Ĉeĥoslovakaj Nevidantaj Esperantistoj. Red. Praha Nusle II 741 Blindula Presejo.

Utrechta Esperantisto. Of. Org. de Utrechta Esper. Rondo. Red. Degenkamp. Rietstrat 40 Utrecht.

Les heures nouvelles — franclingva ilustrita revuo dumonata, 3 rue Reclamier Paris 7-e, eldonata de franca Ligo por Instruado.

Grava propagandilo por francaj edukistoj kaj gepatroj, (eldonata en 20.000 ekz.) tuŝas gravajn edukajn problemojn kaj enhavas esperanto-parton kaj esperanto-kurson por francoj.

Skolta Bulteno — of. org. de la Skolta esp. Ligo — Red. 23 East Dulwich Grove London S. E. Anglujo.

Ĝi mencias, ke la Krakova esp. Kongreso estis la unua, kiu oficiale akceptis rezolucion pri Skoltoj. Represita karto de protokolo de dua kuns'do 5/VIII 1931, kie F-no M. Kleinberger (Hung. Esp. As.) raportas pri la propagando de la S. Movado.

Gazet-Servado por Sociaj Asekuroj. Monata Red. Fr. Bohlman — Berlin, Charlottbg — Krumme str. 87.

Foire Paris 23 Rue Notre Dame de Victoire Paris.

Juna Esperantisto. Monata Org. de la skolta Movado. Red. Mayer, Kraków, Lelewela 9.

(FINOTA).

ĈU VI JAM FINPAGIS LA ABONON POR J. 1932?

SE NE

PAGU TUJ JE NIA KONTO P. K. O. 406.660.

RENOVIGU LA ABONON POR JARO 1933!

Abonu mem kaj varbu novajn abonantojn por la sola esperanta gazeto en Pollando!

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup espw. (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jednym adresem) prenumerata roczna zł. 6.— Zagranicą: 1 dol. Numer pojedynczy zł. 0,70.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

REDAKCJO KAJ ADMINISTRACJO: KRAKÓW, LUBICZ 34.

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.— Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono zł. 6.— Eksterlande 1 dolar. Aparta numero zł. 0,70.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

KONTO P. K. O. NR. 406.660

Redaktor odpowiedzialny Juliusz Kriss.

25-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, KÖLN (GERM.)

29-a DE JULIO ĜIS 5-a DE AŬGUSTO 1933

Adreso: 25-a Universala Kongreso de Esperanto, Trajanstr. 25, Köln, Germ.

Poŝta ĉekkonto: 25-a Universala Kongreso de Esperanto, Köln n-ro 52

Bankkonto: Dresdner Bank, Depositenkasse Chlodwigplatz. Köln, Germ.

ALIĜILO

Skribu tre legeble — prefere per skribmaŝino!

Subskribint(in)o deziras aliĝi al la 25-a Universala Kongreso de Esperanto kaj pagas la sekvantajn kotizojn:

1 Kongresa Karto	Germanaj Markoj	20.—
" " pagota ĝis la 31 de Marto 1933	" "	18.—
Junula(j) Karto(j) po gmk. 5.—	Germanaj Marko
(Vidu klarigon dorse)		
Donaco al la Kongresa Kaso	Germanaj Markoj
Donaco al la Blindula Kaso	Germanaj Markoj
Mi sendas ĉi-kune la sumon de	Germanaj Markoj

per ĉeko, poŝtĉeko, mandato, per monbileto(j) en registrita letero, per banko

per

Familia nomo ¹⁾ { S-ro
 { S-ino
 { F-ino

Personaj, antaŭ- aŭ baptonomoj ¹⁾

Profesio ²⁾

Nacieco ²⁾

Strato ¹⁾

N-ro

Urbo ¹⁾

Provinco ¹⁾

Lando ²⁾

Kune venos gejunuloj (malpli ol 17-jaraj), kies nomoj estas:

.....

Dato:

Subskribo de la Kongresano:

193

¹⁾ En nacia lingvo.

²⁾ En Esperanto.

Vidu dorstflanken!

Gravaj klarigoj

1. La ordinara kotizo por la 25-a Universala Kongreso de Esperanto estas germ. mk. 20.—, por gejunuloj malpli ol 17-jaraj germ. mk. 5.—.
2. Por frualiĝontoj, kiuj estos pagintaj sian kotizon ĝis 31-a de Marto 1933, la kotizo estas nur germ. mk. 18.—, por gejunuloj germ. mk. 4.50—.
3. Post 1-a de julio 1933 la kotizo plialtiĝos al germ. mk. 25.—, por gejunuloj al germ. mk. 6.—.
4. Post ricevo de la kotizo, la Loka Kongresa Komitato sendos kongresan karton.
5. Je konvena tempo ĉiu kongresano ricevos diversajn mendilojn por loĝado ktp. kaj eventualajn kongresajn eldonaĵojn.
6. Ĉiujn kongresnovaĵojn bonvolu legi en la Esperanta gazetaro. „Heroldo de Esperanto“ aranĝos je konvena tempo ĉiusemajnan kongresrubrikon.

Rezervita por la Kongresa Oficejo

Aliĝilo:

Pago: a) Kongresa Kotizo

b) Junula(j) Kotizo(j)

c) Donaco al la Kongresa Kaso

d) Donaco al la Blindula Kaso

Kongreskarto:

Mendiloj: